

KOMENCANTO

revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Kononova Snejana [N.Omka, Rusio]

2004

Kiel Sylla Chaves, elstara E-aktivulo kaj verkisto el Brazilo, iĝis esperantisto
vintraj verkoj de niaj legantoj — neelpensitaj historioj
gramatiko amuze kaj serioze — aforismoj — anekdotoj — ripozejo
la praktiko — korespondu!

6

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

Argentino Argentina Esperanto-Ligo. Casilla de Correo 2910 - Correo Central. AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA. Esperanto-domo. 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140. BE-2000. Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo. Caixa Postal 03625. Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Eric Walker. Downham Reach Cottage. Nacton. Ipswich. IP10 0LA

Ĉeĥio Vladislav Hasala. A Dvorčka I. CZ-696 62 Stržbnice

Ĉinio Ĉina Esperanto-Ligo. PO Kesto 825. CN-100037. Beijing

- S-ro Cui Jiayou. P.O. Kesto 448. Lixin 158120. Jixi. Heilongjiang

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper. Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.

Estonio Virve Ernits. Villimaa 17 -- 8. EE 93812. Kuresaare

Finnlando Heta Kesala. Kalamichenkuja 3 D 32. FI-04300. Tuusula

Francio Unuiĝo Franca por Esperanto. 4 bis. rue de la Crisaic. 75004. Paris.

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzler. Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero. adv. Obispo Quesada n=BA14. 6D. ES-40006. Segovia.

Irano Irana Esperanto-Centro. P.O.Kesto 17765-184. TEHRAN

Italio Itala Esperanto-Federacio. Via Villoresi, 38. 20143. Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio Višnja Branković

Via Leghissa 6. IT-34131. Trieste

Irlando Esperanto-Asocio de Irlando. 9 Templeogue Wood. Dublin 6W

Japanio Japana Esperanto-Instituto. JP-162-0042. Tokyo-to. Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio. Apartat 290. ES-08200. Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo. str. 25 #5611 c/5646 Playa 11300. Havano

Litovio Litova Esperanto-Asocio. LT-3000. Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo. Olaf Schous vei 18. N-0572 Oslo

Nov-Zelando David Dewar. 4 Harlech Mews. Christchurch 8004

Pollando Maciej Wnuk. Skrytka 105. ul. Broniewskiego 77-137. PL-01-865 Warszawa

Portugallio Portugala Esperanto-Asocio. rua Dr. Joao Couto, N.6. R/C.-A. 1500 Lisboa

Svedio SEF. Lisbet Andreasson. Sodra Rorum. Husarlyckeavagen 29. SE — 24294 Horby

Svislando Christoph Scheidegger. Im Schleedorn 6. CH — 4224 Nenzlingen

Usono Esperanto Ligo por Norda Ameriko. P.O.Box 1129. El Cerrito. California 94530. U.S.A.

Redakcie

Karaj legantoj!

Tempo pasas rapide kaj la preterflugintaj sep jaroj alproksimigis nin al tiu ĉi 50-a kajero. Nin ĝojigas, ke dum tiuj jaroj "Komencanto" el malgranda 8-paĝa bulteneto fariĝis internacie rekonebla periodaĵo kun propra vizaĝo kaj karaktero.

Malgraŭ diversaj krizoj kaj obstakloj dum la tuta periodo de la ekzisto ni penis pliriĉigi la revuon en have kaj pli-bonigi ekstere (laŭ niaj modestaj rimedoj). Sed ĉefe ni strebis fari "Komencanton" pli interesa kaj utila por vi, celis, ke la revuo estu ne nur invito al legado, sed donu bonan puŝon al verkado. Estas ĝojigaj rezultoj, atingitaj tiudirekte, ĉar ne nur ni, redakcianoj, malkovras komencantajn aŭtorojn, sed ofte nun aŭtoroj, eksciinte pri la revuo de iu aŭ aŭdinte pri ĝi per Esperanto-radio, turnas sin al la redakcio kun siaj verkoj. Kelkaj el niaj legantoj iĝis konstantaj kunlaborantoj kaj veraj fidindaj amikoj, ĉar kelkara kunlaborado por la revuo cementis ankaŭ grandan amikecon. Tial ni tutkore dankas al Martin Ginette kaj Yves Brusq el Francio. Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser el Germanio, Santi Elena Bullo kaj Domenico Trombetta el Italio, Ralf Jalming el Svedio, Vladimir Opletajev, Igorj Belousov, Sergej Pahomov, Margarita Zujeva, Tatjana Vŝivceva kaj Anna Kornjuhina el Rusio. Materialoj, sendataj de ili konstante vokas grandan intereson ĉe la legantoj

Malnova amiko de "Komencanto", monde konata esperantisto el Samarkando (Uzbekio) Anatolij Ionesov, gratulante nin, alsendis la sekvan ĝustan esprimon.

"... ni ĉiuj estas iusence komencantoj, malkovrante novajn vortojn, esprimojn, sciojn... Sendepende de la aĝo ni foje komencas ion interesan.."

Do, vivu komencantoj!"

Feliĉon kaj sukcesojn al vi en la nova 2005 jaro!

KOMENCANTO

2004 numero 6 // (50) // 6 numeroj jare
regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

konstanta kunlaboranto Raja Kudrjavceva

adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2005:

internacia tarifo: 15 eŭroj

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: 12 eŭroj;

konto ĉe UEA: **vkud-a**

rusia tarifo: 150 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Sylla Chaves estas elstara esperantisto el Brazilo, Esperanto-instruisto kaj E-poeto. En diversaj periodoj de sia vivo Sylla Chaves estis estro de Brazila Esperanto-Ligo, akademiano de la Akademio de Esperanto (1986-1995). Li magistriĝis pri komunikado en Stanford (Usono) kaj ankaŭ studis juron en Rio de Janeiro, kibernetikan pedagogion en Paderborn (Germanio) kaj politikan sciencan en Parizo. Plurjare li estis oficisto de UN en Nov-Jorko kaj de UNESKO en Parizo. Tiam li regule partoprenis en la esperanta kabareto de Raymond Schwartz. Sylla Chaves tre multe verkas en Esperanto, liaj verkoj estis premiitaj en pluraj belariaj konkursoj de UEA kaj aperis en diversaj esperantaj antologioj.

Mia esperantistiĝo verŝajne estis planita kaj skribita



La unua araba vorto, kiun mi lernis, estas *maktub* – kiu signifas skribita. Ĝi estis la nomo de unu el la arabaj histonetoj adaptitaj de fama brazila verkisto, kiuj beligis miajn fantaziojn de legema knabeto. Poste mi komencis konsciiĝi, ke preskaŭ ĉio grava en mia vivo ŝajnas esti planita kaj skribita antaŭ mia naskiĝo. Centoj da tiaj okazajoj meritis esti rakontataj. Kelkajn mi jam rakontis en libroj, revuoj aŭ prelegoj. Multaj rilatas al lingvoj (precipe Esperanto) kaj povas interesi vin. Mi elektis kelkajn, por ke vi konkludu, ĉu jes aŭ ne mi estas marioneto movata per fadenoj, pendantaj el la manoj de iu Potenco Senkorpa Mistero, laŭ teksto pri mi skribita en la libro de l' destino. Mi firme kredas, ke tio estas almenaŭ akceptinda supozo.

Mi naskiĝis ĉe suda brazila landlimo pli-malpli 200 metrojn distance de Urugvajo. Mia naskiĝurbo estas la brazila Santana do Livra-

mento, denaske algluita al sia urugvaja ĝemelino Rivera. Estante nur sepjara, mi ricevis la permeson traini sola la landlimon por aĉeti bongustegan urugvajan panon. Mi fiere plenumis tiun taskon plurfoje. Kaj ankoraŭ memoras la kuriozan konstaton, ke mi atingis la panejon en horo pli frua ol tiu de la eliro el mia hejmo. Tio okazis, ĉar la oficiala tempo de Urugvajo kaj de suda Brazilo tiam havis duonhoran diferencon.

En tiu sama jaro tre interesa homo transloĝiĝis al nia urbo. Lia domo estis en malproksima kvartalo, sed najbaro lia estis amiko de miaj gepatroj, kaj informis nin, ke tiu homo intencis instrui Esperanton al kelkaj najbaroj. Miaj gepatroj tre ŝatis lingvojn, kaj tial tuj ekinteresiĝis. Malgraŭ la distanco kaj la malfrua komenco de la kurso, ili ĉeestis tiun kurson ĝisfine, kun miaj pliaĝaj gefratoj. Sed mi restis hejme, ĉar mi estis tro juna, kaj devis enlitiĝi frue.

Mi restis hejme, sed scivole aŭskultis ĉion, kion ili rakontis. Tre impresis min la diroj pri la travivaĵoj de la knabo Ludoviko en sia urbo Bjalistoko. Mi imagis, kiel malbona estus la vivo en niaj ĝemelaj urboj se la lingvoj hispana kaj portugala ne estus tiel similaj unu al la alia. Kaj precipe interesis min la unuaj leteroj en Esperanto ricevita de mia fratino Marilja. Mi avide aŭskultis ŝin pri la leteroj alvenintaj el Finnlando, Japanio kaj Nov-Zelando.

Marilja estis la unua vera esperantistino de la familio. La ricevitaĵojn ŝi transformis en belegan kajeron. Ŝi akiris vortareton kaj kelkajn Esperantajn librojn. Inter ili elstaris la Fundamenta Krestomatio kaj la Zamenhof-stila romano "La Vid-

vineto", majstre elportugaligita de akademiano Porto Carreiro Neto. Malgraŭ sia juneco (ŝi estis nur 15-jara), Marilja rapide kaj lerte plonĝis en la Esperantan vivon. Sed la daŭngo de niaj vivoj en la libro de l' destino gardis surprizon por ni ambaŭ, kaj eble ankaŭ por miaj legantoj.

Kiel fulmo, la Esperanta vivo de Marilja estis brila, sed ne daŭris longe. Ŝi havis aliajn gravajn taskojn por plenumi. Ŝi fariĝis unu el la unuaj brazilaj inĝenierinoj. Tuj post sia diplomistiĝo (kun ora medalo), ŝi fariĝis help-instruistino en du branĉoj de la Inĝenierarta Fakultato. Fariĝis ankaŭ matematikistino. Kaj, kune kun sia edzo, ŝi antaŭenpuŝis kelkajn avangardajn matematikajn konojn. Tial, ŝi fariĝis la unua membrino de la Brazila Scienca Akademio. Kaj ŝi estus farinta multe pli en la scienca tereno, se la morto ne estus forportinta ŝin, kiam ŝi estis nur 40-jara.

De Marilja mi ricevis la emon al matematiko. De miaj gepatroj mi ricevis la emon al lingvoj, poezio, vojaĝoj kaj monda paco. Estante brazilanoj, ili interkonatiĝis en Genevo, kie ambaŭ loĝis dum la unua mondmilito. Dum ilia amindumo kaj dum ilia 50-jara geedza vivo, ili ofte korespondis per poemoj. De mia vojaĝemo kaj de mia naskiĝo ĉe landlimo fontis mia grandega intereso pri geografio.

Post la esperantistiĝo de Marilja, mi plurfoje ekstudis Esperanton, prunteprenante ŝian kajeron kaj testante kun ŝi mian prononcon. Sed tiu renoviĝanta ekstudo neniam daŭris pli ol kelkajn tagojn, ĝis la komenco de la jaro 1946, kiam mi decidis fari tion serioze. >>>

Mi faris tion memleme, kun nura helpeto ŝia. Mi unue studis per ŝia kajero, ĝisfine. Kaj poste, kun helpo de ŝia vortareto, legis ŝiajn du librojn: "La Vidvineto" kaj "Fundamenta Krestomatio".

Ni legis en gazeto informon pri prelego de mondvojaĝanto en la sidejo de Brazila Esperanto-Ligo, en Rio. Kvankam Rio jam estis nia hejmurbo, mi tiam liber-tempis en mia suda ŝtato, kaj tial ne ĉeestis tiun interesan prelegon (de Tibor Sekelj). Mi tamen eksciis, ke estas organizita Esperanto-movado en Brazilo. Reveninte al Rio en marto (komenco de la brazila lernojaro), mi definitive plonĝis en la Esperanto-movadon. Tiam la movado en Rio estis tre vigla. Estis kunvenoj kaj ekskursoj, kie oni nur parolis en Esperanto. Tiel mi rapide transformis mian legoscion en parolkapablon. Kaj enskribiĝis samtempe en elementan kaj superan kursojn. En tiu sama jaro, mi ricevis du Esperantajn diplomojn de BEL. La 6an de julio 1946 mi ricevis ĝian elementan ateston pri lernado, kaj la 28an de decembro mi fariĝis profesoro aprobata, post ekzameno direktita de la postulema akademiano Porto Carreiro Neto. Eble tio estis skribita en la libro de ĝi destino. La esperantisto estis mi, ne Marilja. Ŝi estis la gravega sciencistino. Kaj (bonsance por mi) ankaŭ la ponto por ke mi atingu la verdan vojon, kiun mi nun laŭiras. *Maktub!*

Kiel mi diris en la unua paragrafo, mi elektis plurajn okazaĵojn de mia vivo por rakonti al vi, sed la spaco de la rubriko "Kiel tio komenciĝis?" en la revuo KOMENCANTO estas malgranda. Por ĝi sufiĉas tiuj ĉi okazaĵoj: unu en 1937, alia en 1946. Multaj aliaj sekvis. Kiel mi (estante nur 20jara) fariĝis oficisto en la Sekretariejo de UN en Novjorko en 1950? Kiu forto puŝis min al profesora kariero en Rio, en 1953? Kaj al Parizo, por studoj (kaj ekkono de la tiea E-movado) en 1954? Kaj denove al Parizo, por fariĝi oficisto de Unesko en 1957? kaj al la Universitato Stanford, por magistriĝi pri komunikado (kaj kunlabori kun la tiam floranta kalifornia E-movado)? Kial mi estis puŝata al la prezidanteco de BEL en 1978? Kial estis tiom da rakontindaj okazaĵoj dum miaj vojaĝoj tra la mondo? Ĉu pro simpla hazardo? Aŭ estis skribite?

Karaj legantoj! Ĉi tie ni prezentas al vi diversspecajn verkojn de Sylla Chaves, esperante, ke poemo "Ĉu gajno aŭ ŝajno?": same kiel la aŭtora historio de esperantistiĝo, malkovros al vi profundan vivan filozofion kaj mondpercepton de la verkisto. Kelkaj liaj poemoj sur la najbara paĝo estis verkitaj por komencantoj kaj ilin eblas bonuzi, eĉ kanti hore dum E-lectionoj.

Sylla Chaves [Rio de Janeiro, Brazilo]

Ĉu gajno aŭ ŝajno?

Iam, dum vesper' sensuna,
inter viro kun galonoj
kaj alia kun liuto,
pri la nuna monda bono
ekaŭdiĝis ĉi disputo:

- Ni vivas en jaroj superaj de homa progreso!
- Ni vivas en jaroj suferaj de homa regreso!
- La homoj atingis la vojon al Luno!
- La homoj estingis la ĝojon de P nuno!
- Ni gajnis!
- Nur ŝajnis!

- Scienco disdonas kaj lunojn kaj stelojn!
- Sensenco aldonas kaj murdojn kaj ŝtelojn!
- Prahomoj vivaĉis en bestaj kavernoj!
- ... kaj nun ni vivaĉas en pestaj kazernoj!
- Ni gajnis!
- Nur ŝajnis!

- Aĉetas dolaroj progreson de P mondo,
kaj marŝas homaro al brila estonto!
- Ja marŝas... marŝadas marŝaloj armitaj...
Aĉetas? Aĉegas dolaroj militaj!
- Doloraj dolaroj!
- Ni gajnis!
- Nur ŝajnis!

Tiele kaj sencele
Disputas kaj disputos
VORTO kontraŭ FORTO.
Ĉu gajno aŭ ŝajno?

Lernu Esperanton

Vi lernu, amiko mia,
la lingvon de la estonto!
Kun lingvo internacia
pli bona estas la mondo!
Aŭskultu ĉi tiun kanton!
Amiko, aŭskultu min!
Se vi lernos Esperanton,
la mondo komprenos vin!



Bonan Tagon

Bonan tagon! Bonan tagon
mi deziras al vi!
Havu bonan tagon!
Havu bonan tagon
vi kaj la famili'!
Nun sidiĝu! Nun sidiĝu,
mia kara fraŭlin'!
Diru nun belsone:
Ĉu vi fartas bone?
Belulin', kisu min!
Ĝis revido! Ĝis revido,
mia kara fraŭlin'!
Ĝis alia fojo!
Estos granda ĝojo
vidi vin, kisi vin!



Pli ol mil steloj

Unu, du, tri steloj oraj...
Suda Kruco havas kvin...
El la vastaj spacoj foraj
milion' rigardas nin.

Kiel ŝafojn de l' ĉielo,
paŝtas ilin plena lun'.
Gaje brilas ĉiu stelo
ĝis alveno de la sun'.



Pace promenas ili...
Pli ol dek, aŭ cent, aŭ mil
ĉiunokte venas brili
en ĉielo de Brazil'.



Familio estas Ĉio

Mi rememoras mian tempon
de printempo
apud patro kaj patrin'.



Por infanoj familio
estas ĉio...
sed ne ĉiuj havas ĝin.

La familio estas bela
don' ĉiela!



En la preĝoj petu ni,
ke por infanoj de la mondo,
en estonto,
ne plu manku famili'!



Ĉi tiujn belajn diversformajn verkojn povas unuigi la vorto "fabelo", ĉar en Novjara poemo de T. Vŝivceva temas pri la fabela lasta nokto de jaro, nia aŭtoro el Germanio Cezar tradukis belegan Kristnaskan fabelon, la traduko de belaj etudoj pri vintro, sendita al "Komencanto" de V. Opletajev, ankaŭ prezentas fabelecon de vintra naturo de Rusio.

Vŝivceva Tajana [Miass, Rusio]

Jaro finiĝas

Lastajn minutojn jam voras degel' —
Jaro finiĝas.

Neĝas surstrate — la nokta fabel'!
Kapo turniĝas.

Baldaŭ heroldos horloĝa sonor'
La Novan jaron.

Kaptu momenton kaj petu, la kor',
Sorton avaran


Pri la feliĉo, la san', la sukces',
Amaj inspiroj,
Kaj realiĝu sen ajna escept'
Viaj deziroj!

Sonas horloĝo, vezikas ĉampan',
Vortoj bombastaj...
Staras ni kune, la mano en man',
Simplaj du gastoj.

Kio okazas? Ĉu songo? Vizi??
Aŭ ĉu realo? —
Preter ceteraj al mi, nur al mi
Hastas vi pala.

Sonas muziko — invitas al danc'.
Mian talion
Firme, sed mole tuŝetas kun pac'
Manplato via.

Dancas la paroj, bolegas la viv'
Ŝaŭmas ĉampano...
Tiel kvietas mi kune kun vi
Man' en la mano...



Dalmatova Daŝa [Jelec, Rusio]

Helga R. Rossmeis
el la germana esperantigis Cezar
[Altenburg, Germanio]

La fabelo pri la unua neĝo

Estis iam fabelo. En tiu fabelo ludis rolon reĝo, kiu loĝis en kastelo. La reĝo havis filinon, kiu estis tre beleta. Ŝi havis gajajn blondajn buklojn, afablan vizaĝon kaj vestis sin per admirinde belaj vestoj, tiel, kiel tio decas por ĝusta principino en fabelo.

Kompreneble venis multaj junaj principoj el la najbaraj landoj kaj petis ŝian permeson edzinigi ŝin. Kiam ili refoje estis kolektiĝintaj en la kastelo, la principino parolis al ili: „Mi elektos tiun el vi, kiu sukcesos malmendi la pluvon.“

- La pluvon, ĉu? - demandis la principoj mirigite.

- Jes ja, la pluvon! - respondis la principino.

- Mi malamas la pluvon! Li faras malsekaj miajn admirinde belajn vestojn kaj faras, ke miaj blondaj bukloj malgaje pendas. Ĝi faras min malbela, kaj principino ne devas esti malbela!

Unu el la principoj, kiuj aŭskultis tion, decidis tuj ekiri, por helpi al la kompatinda principino. Li surmetis la ŝelon al la ĉevalo kaj rajdis sur la plej proksima ĉielarko, kiun li trovis, rekte en la ĉielon. Ĝis la domo de la pluvofaristo. La principino frapis la pordon kaj la pluvofaristo malfermis ĝin por li.

- Bonan tagon, - diris la principino, - mi estas veninta por demandi vin, ĉu vi povas malmendi la pluvon? Ĝi faras la kompatindan principinon tiom malbela.

- Malmendi mi jam ne povus la pluvon, - klarigis la pluvofaristo, - la arboj kaj la floroj bezonas ĝin, sed eble mi povas iom ŝanĝi la pluvon, tiel, ke ĝi ne plu faru la principinon malbela. Sed por tio mi bezonas vian helpon.

La principino devis promesi konduki la principinon eksteren, tuj kiam la unua vintrotago estos komenciĝinta. Pasis multaj semajnoj, kaj kiam venis la unua ĝuste frosta tago, la principino plenumis sian promeson. La principino gracie paŝetis apud li en la kastelparko. Ŝi frostotremis terure, kaj preskaŭ es-

tus klakinta siajn dentojn, sed ion tian principinoj ja ne faras. Post certa tempo la principino rigardis timigite supren en la ĉielon.

- Pluvas! - ŝi vokis. - Mi sentis pluvoguton.

Efektive komencis pluvi, sed la gutoj estis strange facilaj. Ankaŭ ne estis pluvogutoj, kiuj falis el la ĉielo. Estis nuraj etaj blankaj flokoj!

Plena de miro ambaŭ stariis tie kaj rigardis la miraklon: blankaj pluvogutoj, kiuj aspektis kiel ege etaj vatobuloj - io tia ekzistis ja ankoraŭ neniam! La neĝeroj sidigis softe sur la blondajn buklojn de la principino. Ili sidigis sur ŝian robon kaj la ŝuojn. Kelkaj neĝeroj kroĉigis je ŝiaj okulharoj kaj trembrilis tie, ĝis ili degelis for. La plej grava tamen estis, ke ili faris la principinon belega! Eĉ la reĝo estis ravita, kiam li ekvidis la principinon tia. Kaj kiam la principino rakontis, kiel tio okazis, ke fariĝis el la pluvo neĝo, la principino konsentis iĝi lia edzino. La reĝo ĝojis pri tio, ke lia filino elektis fianĉon, kaj benis ilin. Nu, vidu, karaj, se nia beleta principino el la fabelo tiam ne estus havinta la eksterordinaran deziron, kaj se la principino ne estus plenuminta ĝin, eble ĝis nun ne falus neĝeroj je la kristnaska tempo.



la bildon alsendis Dorothea Kaiser [Altenburg, Germanio]

Leonid Fjodorov

Esperantigis Vladimir Opletajev [Surgut, Rusio]

Kalendaro de vintro



Vintro! Kiel plenrajta mastro ĝi paŝis sur la tero, neĝokovris koton restigitan de la aŭtuno. Dum unu nokto surŝutis ĝi neĝamasojn, per molaj neĝaj ĉapoj kovris la arbarojn. Lagoj kaj riveroj glaciigis.

Novembro

Ĉie etendiĝas la blanka ebenaĵo kaj ne eblas kompreni, kie estas kampoj kaj kie bulecaj marĉoj. Ĉion ebenigis la vintro.

La tagoj plimallongiĝis, kaj la noktoj fariĝis pli helaj. Ŝajnas, ke ne nur pro la neĝo estiĝis tiel lume, sed ankaŭ pro sennombraj steloj iĝintaj pli proksimaj kaj pli helaj. Malrapide leviĝas la luno, kaj tuj ekbrilas prujne vestitaj arboj kaj milde eklumas kampoj. Ĝis malproksime estas videbla mallarĝa strio de kampa vojo, malhela bendo de arbaro ĉe la horizonto kaj duonŝutitaj de la neĝo fojnamasoj.

Decembro

“En decembro la jaro finiĝas kaj la vintro komenciĝas” – sed ĉe ni en Uralo ĝi estas jam la dua vintra monato. Venas malluma jarsezono. Jam nun ŝajnas, ke

pintoj de pinoj kvazaŭ tuŝus stelojn – tiel hele brilas ili sur la nigra ĉiela veluro. Sed baldaŭ venos pli nigra nokto, kiam la steloj estos pli helaj kaj pli malalte pendantaj.

La vintraj noktoj estas plenaj de silento kaj enigmo. En tiaj noktoj oni povas vidi en la ĉielo miraklajn stelajn pluvojn: devancante unu la alian preterflugas meteoroj. Ekbrilinte kaj vidiginte luman strion ili rapide estingiĝas.

Januaro

Januaro estas mezo de la vintro, la monato de fortaj frostoj, malvarmaj nebuloj kaj prujnoj, tempo de granda blanka silento. La tagoj plilongiĝas, sed ne iĝas pli varme. En helaj malbrujaj noktoj la urala vintro aparte kruelas, hidrargo frostiĝas tre ofte en termometro.

Mirinda kaj mirakla estas la arbara dekoracio vintre. Ankaŭ mem la vintro en rebriloj de glaciaj kristaloj similas al rigora belulino, ŝanĝiĝema kaj skandala. Jen ŝi ridetas karese kaj varme aŭ kaprice ploretas per subita pluvo, jen ŝi turnas sin en neĝblova danco, elspiras per malvarmo kaj kvietiĝas.

Nebuloj ofte kovras la teron, ornamente la arbojn per brilantaj glaciaj dekoracioj. En tiuj ĉi tagoj aperas en la ĉielo anstataŭ unu pluraj sunoj. Kaj ne eblas diferencigi la veran sunon de la falsaj.

Birdoj frostas kaj malsatas. Plimulto de ili migras serĉante nutraĵojn, sed pigoj, kornikoj kaj paruoj proksimiĝas al homaj hejmoj. En ĉasistaj servejoj kaj arbaraj rezervejoj oni elmetas trogojn por birdoj kaj bestoj.

Plenpotenca mastro nun sentas sin vintro akumulinta fortojn. Dekoris ĝi vitrojn de fenestroj. Nenia fantazio de pentristo povus krei ĉi tiajn fabelajn desegnaĵojn de la vintro.

Februaro

Februaro estas monato de neĝoblovoj, frostoj kaj de unuaj degelgutoj. Ĉiutage la suno leviĝas pli alte. Komence de la monato ankoraŭ estas fortaj frostoj, sed en ĝia mezo pli rimarkeble pli varme brilas la suno, en iuj tagoj sonore falas de la tegmentoj rapidaj gutoj, formante girlandojn de travideblaj glaci-pendadoj.

Sur la arbotrunkoj la gluiĝinta neĝo konservas sin nur ĉe la norda flanko, de la suda ĝin forigis sunradioj. Tial nomas la popolo februaron “flankovarmigulo”.


La popola kalendaro havas por tiu ĉi monato alian kromnomon: “kurbaj vojoj”. Pli ofte blovas nun ventoj. Super la kampoj furiozas blizardoj, levante alte super la neĝamasojn nubojn de neĝo. Superblovas vojojn kaj padojn kruela sterna vento.

La arbaroj perdas sian vintran dekoron, pro la vento ŝutiĝas fajna prujno, pinoj kaj abioj formetas neĝajn ĉapojn. En la klara aero estas malproksime videblaj Uralaj montoj. Altaj pinoj sur iliaj deklivoj, kiel sentineloj kun akraj piko, gardas la vintran kvieton.

* * *

La vintro finiĝas. Pro la sunradioj iom degelis neĝamasoj de la suda flanko, el la malheliĝinta grajneca neĝo direkte al la suno elstaras klingoj de glaciaj ponardoj. Kvazaŭ vintro-maljunulino pretiĝis al definitiva batalo kontraŭ la venonta printempo. Streĉante siajn fortojn spiro ĝi per frostoj kaj ekhurlos, ekfajfos malicaj neĝoŝtormoj.

Sed ĉio estas vana! Egale retiriĝos ĝi sub la premo de la suno kaj vento. En vapornubetojn kaj kirliĝantaj rojoj transformiĝos ĝiaj pompaj vestoj.



trovis kaj esperantigis **Belonogov Igorj** [Troick, Rusio]

Iom da vero pri Sankta Nikolao

Serca statistiko

Hodiaŭ proksimume unu miliardo da homoj sur nia planedo festas Kristnaskon – feston, kiu jam perdis sian aŭtentikan religian enhavon kaj iĝis festo familia kaj hejmeca, kiam ĉiuj parencoj kolektiĝas kune, faras donacojn unu al la alia, kaj la infanoj nepre atendas Sanktan Nikolao, kiu venas el Laplando en la sledo, jungita per nordaj cervoj (rangiferoj), penetras en kamentubojn, metas la donacojn en ŝtrumpetojn kaj sub la novjaraĵon abion kaj poste mistere malaperas tra la sama kamentubo.

Estas interese tamen kalkuli:

Se ni konsideras, ke (laŭ statistiko) ĉiu familio averaĝe konsistas el 3,5 homoj, tiam okazas, ke Sankta Nikolao dum la Kristnaska nokto devas viziti ĉirkaŭ 300 milionoj da hejmoj!

Se konsideri, ke Sankta Nikolao veturas de oriento al okcidento, tiam lia labora tago (nokto) daŭras 31 horojn dank'al *horaj zonoj* kaj rotacio de la Tero. Tiam rezultigis ĉirkaŭ dek milionoj da vizitoj de hejmoj dum unu horo aŭ 2700 vizitoj en unu sekundo!

Tio signifas, ke por vizito de unu hejmo Sankta Nikolao havas nur 1/3000 de sekundo! Dum tiu tempo li devas:

- a. parkigi la cervojn;
- b. elstari el la sledo;
- c. ensalti en kamentubon;
- d. enŝovi donacojn en ŝtrumpojn;
- e. meti la aliajn sub novjaraĵon abion;
- f. formang'i kukon, preparitan por li;
- g. elrampi el la kamentubo;
- h. sidig'i en la sledon kaj starti plu!

Gajan Kristnaskon kaj feliĉan Novan Jaron!

Interalie

Aŭstralia Sankta Nikolao veturas ne per cervoj, sed per vela jakto.

Pli ol duono de la loĝantaro de ter-globo neniam vidis la neĝon, eble nur per televido kaj sur fotoj.

Kiel ursoj renkontas la Novan jaron

Vintron, la plej severan sezonon, la brunaj ursoj kutimas pasigi en neĝaj ursokavoj. Oni povas pensi, ke la ursoj la tutan vintron dormas. Sed tio ne estas profunda dormo kiel anabiozo, sed tre sentema, atenta dormemo. Kiam la urso kuŝas en sia ursokavo senmove, ĝia korpulma funkciado malaktivigas, korpa temperaturo iĝas 29-34 gradoj, post 5-10 enspiroj okazas paŭzo, kiu povas daŭri 4 minutojn. En tiuj kondiĉoj la besta korpo ege ŝpareme eluzas rezervon de subhaŭta graso, kiun ĝi akumulis dum abundaj aŭtunaj manĝoj.

Daŭro de vintra dormo de brunaj ursoj dependas de geografia situacio: en nordaj regionoj la ursoj kuŝiĝas dormi fine de oktobro kaj eliras fine de aprilo, sed en la sudaj regionoj la ursoj povas esti aktivaj la tutan vintron.

Verkis *Vladimir Plungian*

Tradukis *Sergej Pahomov* [Kirov, Rusio]

Lingvaj grupoj kaj familioj



Ĥismatulin Arzur [Tirovick, Rusio]

Unu lingvo donas komencon por aliaj lingvoj. La lingvoj, havantaj unu komunan praavon, nomiĝas grupo de parencaj lingvoj. La parencaj lingvoj de unu grupo kutime similas inter si. Ĉiu hispano diros al vi, ke hispana kaj itala lingvoj tre similas, sed la franca ne tre similas al la hispana, tamen ankaŭ en la franca hispano preskaŭ ĉion komprenas. Proksimume la samon diros ruso pri la bulgara kaj pola, dano diros pri la sveda kaj islanda.

Ĉu ĉiuj lingvoj havas parencojn? Okazas, ke ne ĉiuj. Ĉiu lingvo havas praavon, sed ne ĉiu lingvo havas idon. Eĉ se iu lingvo havas parencojn, ili ja povas malaperi dum tempo kaj ĉi tiu lingvo restas unusola, sen proksimaj parencoj. Tiu lingvo konsistigas grupon, en kiu estas nur ĝi mem. Ekzemple moderna greka (ĝi nomiĝas *novogreka*) konsistigas grekan grupon, kie estas nur la greka.

Ni esploru du diversajn grupojn de parencaj lingvoj: *slava* kaj *balta*. En slava grupo krom la rusa, belorusa, ukraina estas ankoraŭ pola, ĉeĥa, slovaka, bulgara, makedona, serba-kroata, slovena, k.a. Balta grupo konsistas nur el du lingvoj: latva kaj litova, similaj inter si. Ekzemple *urso* litove estas *lokys* (prononcu *lokis'*) sed latve *lacis* (prononcu same Esperante). Tamen kompreni unu la alian por latve kaj litove malfacilas.

Ĉiuj slavaj lingvoj havas unu komunan praavon – praslavan lingvon. Prabalta lingvo estas komuna praavo por lingvoj litova kaj

latva. Se ni komparas lingvojn praslavan kaj prabaltan, ni ekvidus, ke la lingvoj estis tre similaj. Tiom similaj lingvoj kutime apartenas al unu grupo. Tio signifas ke praslava kaj prabalta plejverŝajne parenas inter si kaj havis unu praavon – balta-slavan lingvon. Por ni gravas alia flanko de la afero: inter grupoj de parencaj lingvoj troviĝas tiuj, kies praavoj estas parencaj inter si. Tiaj grupoj formas novajn grandajn grupojn de “malproksimaj parencaj lingvoj”. En lingvistiko ili nomiĝas *familioj*.

Lingvaj familioj

Se pri du lingvoj ene de unu grupo ni dirus: ili tre similas, pri du lingvoj en unu familio ni ne ĉiam povas diri la samon tiel facile. Ilia parenceco estas kuza aŭ pli malproksima. Antaŭ ol kompari vortojn el diversaj grupoj de unu familio, necesas kompreni kiaj estis la vortoj en lingvoj – praavoj de ĉiu grupo. Nur poste eblas kompari antikvajn vortojn inter si. Ĝuste tial malnecesas kompari vortojn persajn kaj anglajn, necesas kompari iliajn praavojn – la praĝermanan kaj prairanan.

Nun en la mondo oni kalkulas ne malpli ol 20 diversaj lingvaj familioj. Aperas demando: ĉu povas parencoj inter si jam lingvaj familioj mem? Ĉu povas ni kompari pralingvojn, de kiuj aperis la familioj? Kelkaj lingvistoj provas tion fari, kaj aperas *makrofamilioj*.

Ni tumu nin al la plej konata lingva familio nome *Hindoeŭropa*. La nomo mem diras ke en la familon eniras lingvoj parolantaj de Eŭropo ĝis Hindio.

Oni supozas, ke iam estis unu hindoeŭropa lingvo, kiu poste disiĝis al multaj lingvoj – idoj kaj tiuj siavice donis komencojn al diversaj lingvaj grupoj ene de hindoeŭropa familio.

Lingvistoj komencis studi hindoeŭropajn lingvojn en 18-a jarcento. Tiam anglo William Jones atentis ke antikva hinda lingvo *sanskrito* entenas multajn vortojn, mirinde similajn al latinaj kaj antikvaj grekaj. Sanskrito ludis en Hindio la saman rolon kiel latino en Romio. Ĝi estis lingvo de religio, filozofio, literaturo, interkomunikado. Koincidoj estis tiom multaj kaj evidantaj ke la simileco ne povis esti hazarda. Tiel oni rajtas supozi, ke la sanskrito kaj la latino, kaj lingvoj de antikvaj ĝer-

manoj, slavoj, baltoj kaj aliaj havas unu komunan praavon, de kiu ili ĉiuj devenis. Tiel aperis scienco pri parenceco de lingvoj *kompara lingvistiko*.

Hindoeŭropa familio

Nun Hindoeŭropan familion konsistigas 7 grandaj grupoj kaj kelkaj apartaj lingvoj, kiuj ne havas proksimajn parencojn. En Eŭropo 5 memstarajn grupojn formas *balta*, *germanaj*, *keltaj*, *romanaj*, *slavaj* lingvoj. En Azio ekzistas *hindoarja* kaj *irana* lingvaj grupoj. Krome estas apartaj grupoj el *albana*, *armena*, *greka* lingvoj.

Popoloj parolantaj la lingvojn, okupas nuntempe grandegan teritorion en ĉiuj kontinentoj. Ankoraŭ nenion ni diris pri mortintaj lingvoj, ekzemple enigma *hetta* lingvo. Tekstoj en ĝi estas pli antikvaj ol en sanskrito. Ĝi estas la plej antikva el ĉiuj konataj hindoeŭropaj lingvoj. En ĝi oni parolis jam en 18-a jarcento antaŭ Kristo sur teritorio de nunaj Turkio kaj Sirio.

Krom nomitaj lingvaj familioj estas ankoraŭ multaj aliaj: *afrazia*, alinome *afrikazia* (lingvoj de antikva egipta ĝis nunaj araba, berbera, hausa k.a.), *altaja* entenas tjurkan grupon (turka, tataro, kazaĥa, kirgiza, uzbeka, ĉuvaŝa k.a. disvastigitaj de Jakutio ĝis Turkio), ankaŭ mongolan lingvon, kaj povas esti ke ankaŭ japanan kaj korean (ne ĉiuj lingvistoj konsentas kun ĉi tio).

Urala familio entenas du grupojn, el kiuj pli konata estas finna-ugora grupo. Ĝin eniras lingvoj finna kaj parencaj estona, karela, samea aŭ lapona, marila, mordova, komia, udmurta. Krome estas lingvoj hungara kaj ĥanta, mansa, la surprizaj parencoj el Siberio! Iam, antaŭ du jarcentoj ili konsistigis unu popolon...

Ankoraŭ kelkaj grandaj lingvaj familioj: *aŭstronezia* (la parolantaj popoloj loĝas en Indonezio, Filipinoj, Madagaskaro, Polinezio), *ĉina-tibeta* (ĉina havas plej multnombrajn parolantaron), *nigera-konga* (plejparto de loĝantaro de Tropika Afriko, ekzemple popoloj bantuaj).

Multaj diversaj familioj estas en Kaŭkazo, Siberio, Norda kaj Suda Ameriko, Aŭstralio! Do por lingvistoj estas longdaŭra, interesa laboro, kie atendas enigmoj kaj mondaj malkovroj. Ĝis nun en malfacile trapasataj anguloj de la mondo lingvistoj malkovras novajn lingvojn, neniam pli frue esploritajn.

LINGVAJ RESPONDOJ L. L. Zamenhof

Pri la esperanta stilo

En mia traduko de "Revizoro" troviĝas iaj frazoj ne tuj kompreneblaj; precipe ofte vi trovos tiajn frazojn en la paroloj de Osip. Tamen ne ĝusta estas via supozo, ke tiaj frazoj estas laŭvorta traduko de la rusa stilo. Osip parolas ne per stilo tute logika kaj literatura, sed per stilo de malklera rusa servisto, kaj mi devis almenaŭ iom konservi tiun stilon, por ne forpreni de liaj paroloj ilian tutan karakterecon. Li ofte simple *kripligas* la vortojn. Mi penis tion ĉi eviti, ĉar, se por la *leganto* oni povas doni klarigojn en la malsupro de la paĝo, al la aŭdanto en la teatro oni tion ĉi ne povas fari. Nur en unu loko mi devis uzi "registreto" anstataŭ "kolegia registratoro" (malalta ofica rango en Rusujo), kaj, anstataŭ doni enuigajn klarigojn, mi simple donis al la vorto signetojn de citado, por montri, ke la vorto estas ne normala. En aliaj lokoj mi uzis esprimojn ne ĝustajn, tamen ne kripligitajn (ekzemple mi intence uzis "kartetoj" anstataŭ "kartoj" (ludaj), "publikajo" anstataŭ "publikeco" k.t.p.). Mi esperas, ke la leganto aŭ aŭdanto facile komprenos, ke tio ĉi estas ne stilo de bona Esperanto, sed stilo de malklera homo, aŭ speciala stilo de tiu aŭ alia prezentata persono.

Kelkaj Esperantistoj pensas, ke mi uzas en miaj verkoj stilon slavan. Tia opinio estas tute erara.

Estas vero, ke slavoj ofte posedas en Esperanto pli bonan stilon, ol germanoj aŭ romanoj; sed tio ĉi venas ne de tio, ke la stilo en Esperanto estas slava, sed nur de tio, ke la slavaj lingvoj havas vortordon pli simplan kaj sekve ankaŭ pli proksiman al la vortordo en Esperanto. La vera stilo Esperanta estas nek slava, nek germana, nek romana, ĝi estas — aŭ almenaŭ devas esti — nur stilo simpla kaj logika.

Tamen ĉio devas esti en ĝusta mezuro. Ankaŭ en Esperanto troviĝas diversaj (ne multaj) idiotismoj, kaj tute malprave kelkaj Esperantistoj ilin kon-

traŭbatalas, ĉar lingvo *absolute* logika kaj tute sen idiotismoj estus lingvo sen viva kaj tro peza; sed kvankam kelkaj el la Esperantaj idiotismoj estas prenitaj *ankaŭ* el la lingvoj slavaj (dum aliaj estas prenitaj el aliaj lingvoj), ili tamen estas ne slavismoj, sed *esperantismoj*, ĉar ili fariĝis *parto de la lingvo*.

La stilo Esperanta ne imitas blinde la stilojn de aliaj lingvoj, sed havas sian karakteron tute specialan kaj memstaran, kiu ellaboriĝis en la daŭro de longa praktika uzado de la lingvo kaj pensado en tiu ĉi lingvo antaŭ ol la lingvo estis publikigita. Se iu slavo ne havas ankoraŭ sufiĉe da *sperto* en la lingvo kaj volos traduki en Esperanton laŭvorte el sia nacia lingvo, lia stilo estos tiel same

malbona kaj sensenca, kiel la Esperanta stilo de nesperta romano aŭ germano. Por ekzemplo mi citos al vi pecon de unu el tiaj leteroj, kiujn mi ofte ricevas de rusoj, kiam ili ellernis la gramatikon kaj vortojn de Esperanto, sed ne konas ankoraŭ ĝian stilon kaj tradukas laŭvorte el sia nacia lingvo. Komparu la stilon de tiu ĉi peco (gramatike kaj vortare senerara!) kun la stilo Esperanta, kaj tiam vi tuj vidos, kiel erara estas la opinio de kelkaj personoj pri la "slaveco" de la Esperanta stilo.



Tiu ĉi sama peco en stilo Esperanta sonus tiamaniere:

"Favora Regnestro!

Honoro havas alkuŝigi, kio laŭ kuracisto kuraco mi en efektiva tempo ne en stato elpleni de donita kun mi al vi promeso; apud kio postaperigas, ke mi turnos sin al domo tra du monatoj, ne pli frue de fino de Aŭgusto".

"Estimata sinjoro!

Mi havas la honoron raporti al vi, ke kaŭze de kuracado, rekomendita al mi de la kuracisto, mi en la nuna tempo ne povas plenumi la promeson, kiun mi donis al vi; mi ankaŭ sciigas vin, ke mi revenos hejmen post du monatoj, ne pli frue ol en la fino de Aŭgusto".

AFORISMOJ

elektis kaj esperantigis Aleksandr Kovaljov [Balej, Rusio]

Kio estas nia vivo? – Loterio!

Loterio estas la plej ĝusta maniero por kalkulado de optimistoj.

S. Obuhov

Regulojn de ludo necesas scii, sed preferindas tiujn regulojn establi memstare.

A. Stok

Ofte la plej granda parto venkas la plej bonan.

T. Livij

Urbo, en kiu al vi malbonsancis, ŝajnas al vi neinteresa de arkitektura vidpunkto.

E. Krotkij

Pri lingvoj

Nur la mortaj lingvoj iĝas vere senmortaj.

A. Rival

Kiu parkerigis angla-rusan vortaron, konas angla-rusan lingvon.

XX

Li povis silenti en sep lingvoj.

F. Wolf

Mi parolas en Esperanto tiel bone, kvazaŭ mi tie naskiĝis.

S. Milligan

Ŝerca terminaro

Anĝela karaktero

estas diabla toleremo.

Dormo

plej bona rimedo kontraŭ dormemo.

Etiketo

kapablo oscedi kun fermita buŝo.

Gimnastiko

por sanaj nebezona, por malsanaj malutila.

Mono

estas kuracilo kontraŭ plejparto de nervaj malsanoj.

Por ĉiam

estas la plej longa frazo.

Senlirejo

estas plej bona loko por cerbumado.

Pri hundoj



Akiru hundon! Tio estas sola maniero aĉeti amon kontraŭ mono.

J. Prohorovckaja

La hundojn oni amas ankaŭ pro tio, ke ili ne volas iĝi majstroj.

G. Malkin

La hundoj ankaŭ ridetas, sed ili ridetas per vosto.

M. Izman

Mi ŝatas porkojn. Hundoj rigardas al ni desube supren. La katoj rigardas al ni desupre suben. La porkoj rigardas al ni kiel al egalaj al si mem.

Winston Churchill

La kato estas plena de mistero, kiel besto; la hundo estas simpla kaj naiva, kiel la homo.

Karel Čapek

ANEKDOTO

elektis kaj esperantigis
Fedina Galja [Jasnij, Rusio]

La plej bona eblo efektiviĝis
estas vekigi.

Bela virino ĝojigas okulojn de viroj,
malbela – de virinoj.

esperantigis
Kojin Viktor [Bureja, Rusio]

Du turistoj trafis en dezerton. Tagoj
iras post tagoj, ili estas apenaŭ vivaj
pro soifo.

— Mi scias, kio nin povas savi, - di-
ras unu el ili.

— Diru, do, kial vi silentas?!

— Ni devas suĉi ŝtonetojn por ne
dezi ti trinki.

— Kie ni prenos ŝtonetojn? Mi vi-
das nur sablon ĝis la horizonto. Mi
pensas, ke ni savigos, se ni trovas
iun rivereton... - diras la dua.

— Jes, vi pravas, - diras la unua, - ja
sur fundo de rivereto ĉiam estas
ŝtonetoj!

Viro estas en la dezerto kaj preskaŭ
mortas pro soifo. Subite li vidas bu-
tikon, rapidas al ĝi kaj petas:

— Akvon, mi petas...

— Ni ne havas akvon, nur vestojn.
Ni povas proponi al vi belajn fra-
kojn...

— Mi volas trinki, mi ne bezonas
frakon...

— Jen, rigardu, ĉe la horizonto sta-
ras restoracio, tie certe devas esti
trinkaĵoj...

Apenaŭ viva la viro denove rampas
tra la dezerto, atingas la restoracion
kaj provas eniri...

— Ne eblas, - diras al li la pordisto, -
ĉar ni ne priservas seufrakajn klien-
tojn.

Renkontiĝas tenisisto kaj futbalisto.
La tenisisto diras:

— Mi aŭdis bonegan anekdoton pri
stultuloj, sed ĝi estas pri stultuloj-
futbalistoj. Do, por vi ne ofendiĝu,
mi rakontos ĝin kvazaŭ pri hokeis-
toj.

— Bone.

La tenisisto rakontis. La anekdoto
ege plaĉis al la futbalisto, li ridegis
kaj diris:

— Estas bonega anekdoto. Tiuj
hokeistoj estas vere stultaj...

Ekzistas interesa popola opinio, ke
ne indas rigardi spegulon dum oni
manĝas, ĉar eblas "formanĝi" sian
feliĉon.

Ankaŭ ne indas trinki antaŭ
spegulo, ĉar oni povos "fortrinki"
sian feliĉon.

Kaj en necesejo preferindas tute ne
havi spegulon...

ANONCO

"Ne permesu trompi vin en alia
loko, aĉetu varojn en nia vendejo!"

Ruben Feldman Gonzales
[Meksiko, Meksikio]

La Graveco de la manĝo en niaj vivoj

A

La japanoj manĝas tre malmulte
da grasajo kaj suferas je malpli da
korinfarktoj, ol la britoj kaj uso-
nanoj.

B

Male, la francoj manĝas multe da
grasajo kaj ankaŭ suferas je mal-
pli da korinfarktoj, ol la britoj kaj
usonanoj.

C

La japanoj trinkas tre malmulte da
ruĝa vino kaj suferas je malpli da
korinfarktoj, ol la britoj kaj uso-
nanoj.

D

La italoj trinkas ekscesajn kvan-
tojn da ruĝa vino kaj ankaŭ suferas
je malpli da korinfarktoj, ol la
britoj kaj usonanoj.

E

Konkludo:
manĝu kaj trinku kion ajn vi volas
— la mortiga faktoro estas paroli
la anglan!

— Ĉu en la Infero estas malbone? — Mi ne scias. Dume neniu plendis.



Angeloj lernantaj flugi

Bill Thorne [Londono, Britio]

Všivceva Tatjana [Miass, Rusio]

Novjaraj ludoj

Novjara stafeto

Partoprenas du teamoj.

Ĉiu teamo ricevas 2 kraĵonojn, 1 skatoleton por alu-metoj kaj malgrandan plaston abion.

Ludanto tenas kraĵonojn, sur kiuj estas metita skato-letono, sur la skatoletono – la abieto, kaj portas la “konstruon” dum iu distanco. Ekzemple, ĉirkaŭiras star-rantan post kelkaj metroj seĝon.

Poste li (aŭ ŝi) revenas kaj redonas la konstruon al la sekva ludanto.

Gajnas la teamo, kiu la unua finas la stafeton, ne faliginte la abieton de la kraĵonoj.

Ornamu abieton.

Partoprenas du teamoj.

Teamanoj elektas inter si “abieton”. Post la starta signalo ludantoj komencas ornami sian “abieton” per la aĵoj, kiujn ili havas sur si (vestoj, ŝuoj, ringoj, zonoj, horloĝoj, ktp). Post la signalo “Stop!” oni kalkulas kiom da ornamajoj ekhavis ĉiu “abieto”.

Gajnas la teamo, kiu “ornamis” sian “abieton” per plej multaj aĵoj.

Skarpo

Partoprenas paroj.


Al ĉiu ludanto oni nodligas sur la kolon skarpon.

La ludantoj starigas popare kaj sen helpo de la manoj penas malnodigi la skarpon de la partnero.

Gajnas paro, kiu la unua malligos ambaŭ skarpojn.

Alikin Viktor [Permo, Rusio]

Krucenigmo “Neĝero”



Natura kreskaĵo, el kiu oni produktas ŝtofojn. 2. Glaciiga malvarmo. 3. Vira nomo. 4. Ambasadoro de la Papo. 5. Legomo. 6. Kemia elemento Rn. 7. Mola meblaĵo. 8. Vitra tubeto, fandfermita en du pintoj kaj entenanta likvan kuracilon. 9. Per kio oni vidas kaj rigardas. 10. Papago (r*) 11. Plirapidigo de io. 12. Alta vertikala cilindro el ŝtono, betono, ligno, metalo, uzata kiel subtenilo.

r* - skribu nur radikon, sen finaĵo “o”

Ŝercaj enigmoj

1

Kio povas flugi je 1000 metroj sub mara surfaco?

2

Kion oni devas fari, ekvidinte verdan hometon?

3


Kion ne eblas formangi dum matenmanĝo?

4

Kun kia rapideco devas kuri hundo, por ne aŭdi sonojn de kaserolo, alkröcita al la vosto?

5

Kien iras kokideto, transirante la ŝoseon?



Respondoj 1. Muŝo en la submaraĵo. 2. Irati la straton. 3. Ves-permanĝon. 4. Kun la nula rapideco. 5. Al alia flanko de ŝoseo.

Karaj amikoj!

Hodiaŭ ni konatigas vin kun la revuo **MONATO**, kiu estas eble la plej bona ekzemplo de praktika uzado de Esperanto ekster la movado.



MONATO

- internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo
- monata revuo en la internacia lingvo Esperanto legata en 65 landoj
- fondinto **Stefan Maul**
- 25a jarkolekto
- aperas principe la 1-an de ĉiu monato;

MONATO

Sendube estas unu el la plej gravaj, interesaj kaj prestiĝaj gazetoj en Esperanto. Tio estas revuo kun aparta karaktero kaj specifa strukturo. Ĝi havas klarajn rubrikojn:

politiko	ŝerco kaj satiro
ekonomio	turismo
kulturo	kuirrecepto
noticoj	poemoj
leteroj	hobio
novelo	spirita vivo
enigmo	lingvo

MONATO

estas gazeto, en kiu raportas aŭtoroj el la tuta mondo nur en Esperanto, sed ne pri Esperanto.

MONATO

havas gravajn principojn, kiuj klare distingas ĝin kontraste al aliaj memdifinaj internaciaj magazinoj, ekzemple usona *Time* aŭ germana *Der Spiegel*.

en MONATO

* aperas nur originale en Esperanto verkitaĵ artikoloj, neniu traduko;

* el iu ajn lando aŭ mondregiono raportas nur loĝantoj de tiu lando aŭ regiono, do ne eksterlandano kiu ne bone scias pri historio kaj kulturo de tiu lando;

* la aŭtoroj verkas ne por hejma, sed por internacia publiko, do prezentas temon tiel, ke ankaŭ leganto en plej fora lando ne havu problemojn kompreni la enhavon;

Principoj de MONATO

1. Respekto al la vero estas la plej alta principo de ĵurnalismo.
2. Publikigitaj informoj, ĉu tekstoj, ĉu fotoj, devas esti zorgeme kontrolataj rilate al la vero. Ilian sencon oni ne devas ŝanĝi nek falsi per prezentado, titolo aŭ bild-klarigo. Dokumentojn oni devas komuniki fidele al ilia enhavo. Ne-konfirmatajn informojn oni devas klare karakterizi kiel onidirojn, supozojn aŭ eblojn. Se temas pri simbola foto, oni klare devas indiki, ke ĝi ne estas dokumenta.

"... mi volas averti, ke la lingvo de MONATO ne estas simpla, ĉar oni ja traktas ankaŭ komplikajn temojn. Do vera komencanto certe ne povas legi sen vortaro apude. Aliflanke, kompreneble, MONATO estas ideala helpo por plibonigi siajn lingvosciojn."

Stefan Maul, redaktoro kaj fondinto

Eldonas:

Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio
telefono +3232343400
monato@fel.esperanto.be

Ĉefredaktoro:

Stefan Maul,
Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg,
Germanio



La mondo iĝas por vi malplikosta.

Nun vi povas malfermi vian mondon kaj ricevi la magazinon MONATO dum tri monatoj senpage.

Por pliaj informoj vizitu

<http://www.esperanto.be/fel/mon>

abonilo 3.3. php aŭ skribu al MONATO

Bill Thorne



RIMARO

OBO
aprobob
globob
mikrobob
robob

OĈO
broĉob
voĉob

ODO
diobob
eksplobob
epizobob
eŝafobob
klopobob
kobob
komobob
metobob
modobob
nodobob
odobob
pagobob
periobob
sodobob

OFO
strofob
ŝtofob
sofob

OGO
demagogob
dialogob
dogobob
drogobob
jogobob
mensogob
nekrologob

OKO
blokob
dokob
epokob
hokob
kokob
lokob
rokob

Anoncetoj

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi estas fraŭlo 32 jara, meznivelulo. Mi volus kor. kun aziaj, latinamerikaj, usonaj kaj eŭropaj esp-j, 20-30 jaraj. Int: sano, fremdaj lingvoj, legado, azia kulturo... Mi ludas gitaron.

Blake Hutchinson
P.O. Box 1313
Tatum, TX

Usono

brazilblake@yahoo.com

Mi estas 25 jara fraŭlo, komencanto, volas interŝanĝi bildkartojn, leterojn kaj fotojn kun Orienta Eŭropo, Afriko, Azio, sed mi respondos al ĉiu. Mi interesiĝas pri muziko, legado, skribado, kaj aŭtoj. Mi volas ricevi fotojn de domoj, kasteloj, pontoj, kaj belaj ejoj for de mia lando.

Paul Macpherson
RR#4 New Glasgow, NS
B2H 5C7

Kanado

citanes26@yahoo.com

Infanoj de 13 ĝis 16 jaroj volas korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj grupe aŭ persone.

Esperanto-klubo
p.k. 740
Volgograd
400082

Rusio

Mi estas 19 jara studento meznivela en Esperanto. Mi ŝatas kolekti bk, pm kaj lemi lingvojn.

Eric Decamps
Rue Albert-Elisabeth, 300
BE-7134 Poronnes
(Binche)

Belgio

eric.decamps@esperanto-jeunes.com

Mi estas 24 jara studento de fiziko, komencanto. Int: libroj, kino, trinki teon, pripensi (filozofii), fiziko. Mi preferas ret-poŝton.

Frank Dressel
Dresden

Germanio

esp-dresden@gmx.de

Mi estas 26 jara viro, meznivela esp-isto. Mi studas lingvosciencan en universitato. Int: mi ludas pianon, verkas kantojn.

Matt Youens

Gravesend, Britujo

matjy@btopenworld.com

Mi estas viro 32 jara, meznivela esperantisto, programisto. Int: komputiloj, katoj, biciklado, Esperanto, sciencfikcio, naturo.

Dan Jacob

Helsinki, Finnlando.

danjac_40@yahoo.co.uk

Kornjĥina Anna [Barnaul, Rusio]



KOMENCANTO 2005

restas revuo por vi,
ne forgesu reaboni!

Mi estas 63 jara virino, sperta esp-istino. Int: lingvoj, popularo, naturo. Mi ŝatas ĉiutagajn temojn.

Paranai Roza
Budapest,

Hungario

saliko@freemail.hu

Mi estas 17 jara fraŭlo, meznivela esperantisto. Int: kulturo, muziko, politiko, amikeco, leteroj. Mia urbo estas inter Rio de Janeiro kaj Belo Horizonte, mi preferas paperpoŝton, sed ankaŭ reton.

Vitor Lopes

str. Otoni Alves, 107
Centro Pedro Leopoldo. MG

Brazilo

vitorlc@sapo.pt

Mi estas 17 jara junulo, meznivela esperantisto. Int: komputiloj, sporto, libroj, lingvoj, muziko, geamikoj, kino, vojaĝoj. Dez. kor. pri sporto, politiko, vivstiloj, intersanĝaj ideojn kaj fotojn.

Joan F. Mir Bonnin

carrer Nicolau de Pachs,
no. 16, 1r 2a
07006 - Palma
Illes Balears

Hispanio

esputniko@hotmail.com

Mi estas 21 jara fraŭlino, komencantino. Int: kudrado, naĝado, poŝtkartoj kaj fotoj, dez. kor. kun samaĝuloj.

Rabezanamananana M.

Lot IVB 315
Ambohimanala
MG 102
Andoharanofotsy

Madagascar

falimanana2003@yahoo.fr

Mi estas 62 jara virino, komencantino, emerita instruistino. Int: komunikado, familio, vojaĝoj, legado. (pref. kor. kun samaĝuloj)

Chantal Wlodarski

154, avde l'Hippodrome
F-62000
ARRAS

Francio

komencanto@r66.ru

http://Komencanto.narod.ru

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

